



Subtene al la regiona, landa kaj loka agado



Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbego Koffi, Elda Doerfler

ENHAVO n-ro 50 > • KER-ekzamenoj • Landa Elano • AMO 91 • < sept. 10



Jam ni atingis la 50-an EKO-komunikon. Tio okazis pro la intensa aperiga ritmo, kiu rezultas el la ĉiam kreskanta inundo de alvenantaj novaĵoj en nia tro aktiva movado. Antaŭ unu jaro, ni atingis la 50-an eldonon nur en novembro. En la jaroj tuj antaŭ la pandemio ni pretigis apenaŭ dudekon da komunikoj. Pro tiu pandemio ege intensiĝis la kvanto da raportoj alvenantaj kaj la reta agado entute tra Esperantujo.

Invitu ekzamenan sesion por novembro

En la lasta semajnfino de novembro la KER-Ekzamena Centro de UEA kunlabore kun <edukado.net> okazigos la **10-an Tutmondan Ekzamentagon** pri la Ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER). Ĉiuj aliaj estis sukcesaj aranĝoj, kiuj signife kontribuis al tio, ke ĝis nun jam 2558 atestiloj estas disdonitaj al la sukcesintoj, kiuj devenas el 81 landoj: edukado.net/ekzamenoj/kandidatoj.

La ekzamenoj povos okazi en via urbo, ekz-e en klubo, kondiĉe, ke vi trovos minimume 5 personojn por ajnaj niveloj sume kaj estos disponeblaj ekzamenloko kaj minimume 2, prefere 3 organizantoj. Pri la kondiĉoj: edukado.net/ekzamenoj/ker/organizantoj.

La ekzamenoj estos je ĉiuj KER-niveloj: B1, B2, C1 kaj eĉ je C2. La KER-Ekzamena Centro de UEA proponas kaj **skribajn kaj parolajn ekzamenojn**, sed lokoj, kie ankoraŭ ne estis KER-ekzameno, eble unue okazigu nur skribajn partojn, por kiuj ne necesas teknikaĵoj, kiel ekzemple retkonekto. En la sama tempo **eblos trapasi ankaŭ rete ekzamenon, sed nur je la C2-nivelo.**

Peto de sesio eblas ĝis la 15-a de septembro: edukado.net/ekzamenoj/formularo.

Por pliaj informoj vizitu la KER-ekzamenpaĝon: <https://edukado.net/ekzamenoj/ker>.

Aŭ skribu al la KER-Ekzamena Centro de UEA: ker-ekzamenoj@edukado.net.

Informojn kun pli da detaloj oni povas trovi ĉe edukado.net/novajhoj?id=876.

Statistikojn ĉe: edukado.net/prie/sinprezentostatistiko?tipo=kandidatoj.

Landa Elano

Registro de landaj laŭdoj pro elstara agado Servo de EKO por la landa agado de UEA

Gravegas, ke UEA rekonu pli adekvate la elstaran agadon de siaj Landaj Asocioj. Ni alvokas por tio tra pli ol ses monatoj, espereble la nova estraro post enhejmiĝo ekagos. UEA jam de jardekoj havas la premion "Trofeo Fyne", kiu pro sia regularo devas bazi sin plene je membrokresko de individuaj membroj. Sed la granda plimulto de landoj montras falon, pro la foraĝiĝo de la membraro. Apenaŭ deko da landoj montras etan kreskon. Tio helpas klarigi, kial la Trofeo ĉesis estas aljuĝita. Tra lastaj jaroj. Necesas alia pli utila solvo: mezuro de la suma aktiveco de Landaj Asocioj sur plej diversaj kampoj: informado, instruado kaj retkursoj, eksteraj rilatoj, kultura agado kma. Ni rigardu la grandan bildon! Ni vidu la esencon.

En tiu situacio post ses monatoj de vana provado, EKO mem elpaŝas proponi solvon. Ni mem estas bone informitaj pri la monda situacio kaj ni proponas elstarigon de du landoj, unu en Eŭropo, la alia en Azio. La aljuĝo donos nur gloron, nenion plian, ĉar, ironie, la elektitaj landoj estas tiuj, kiuj pleje malbezonas financon subtenon. Tio iru al la pli malfortaj landoj. Jen niaj decidoj en alfabeto ordo:



Irano:

Tiu lando agas en nefacilaj cirkonstancoj, sed havas sidejon kaj kunordigas multan perretan agadon tutmonde: por la universitata retgrupo kaj la programo de AMO-seminarioj. Ĝi kontribuadas signife al la daŭra prosperado de ILEI, kiu ŝajnas nun havi aparte aktivan kaj fortan estraron. IrEA bone uzas la reton por instrui nian lingvon kaj konigi sin. Rigardu la retpaĝon ĉe:

<https://www.youtube.com/c/IranaEsperantoAsocio/playlists?app=desktop>

Italio:

IEF organizas jam tra multaj jaroj tre sukcesajn naciajn kongresojn, kiuj altiras partoprenantojn el multaj landoj, inkluzive de Ameriko. Du estraranoj de ILEI estas italaj. IEJ tra jaroj prizorgis junularajn eventojn, elstare IJF. IEF organizos la sekvan Universalan Kongreson, kune kun la junulara IJK kaj la instruista kongreso. Ĝi gastigis kvin sukcesajn AMO-seminariojn.



Ni gratulas la du rekonitajn landojn. EKO planas daŭrigi la aljuĝojn ĉiujare, en aŭgusto aŭ septembro. Ni invitos proponojn kaj rekomendojn ekde junio.

AMO 90 en Italio - rezultoj

La temo de la AMO-seminario estis: 'Sociaj retejoj, kiel starigi kaj prizorgi ilin'

La unuan tagon de la seminario, estis prezento de la ĉefaj sociaj retejoj. Mi diris kelkajn vortojn pri la historio de ĉiu retejo. Mi parolis pri la retejoj pli utilaj al la Esperanta movado; amplekse pri Facebook, Instagram, Telegram, pli mallonge pri YouTube, Twitter, Wechat, Tiktok, Pinterest, Quora, LinkedIn, Amikumu kaj Miavivo.

La duan tagon, mi multe parolis pri la uzo de Facebook, kiu estas la plej populara socia reto inter esperantistoj, klarigante kiel krei konton, kiel krei grupon kaj paĝon kaj la diferencon inter ili. Mi klarigis kion oni povas afiŝi en Facebook, kaj pri pagitaj reklamoj: kial fari ilin kaj kiel funkcias la servo. Mi parolis malpli vaste pri Instagram kaj TikTok, substrekante, ke ĉi tiuj sociaj retoj estas tre popularaj ĉe junuloj kaj knaboj, kaj tial ili ne devas esti neglektitaj. Rakontis sian sperton ankaŭ Vito Tornilli, kiu kunadministras la paĝon kaj la grupon de IEF.

La trian tagon mi parolis pri kelkaj retejoj kiuj povas utili por konigi niajn eventojn, kiel Eventa Servo, aŭ kie ni povas konservi aŭ trovi materialon por uzi en niaj anoncoj kiel <Bitoteko.it>. Poste mi klarigis kiel kaj kion skribi en la afiŝoj donante ekzemplojn de frazoj por kapti la atenton de homoj. Estis interesa temo ankaŭ kiel estas dividita la publiko por la reklamoj (laŭ aĝo, laŭ intereso ktp) kaj kiel oni devas konduti en kazo de delikataj temoj kiel sekso, genro, politiko kaj handikapo. Mi ankaŭ donis kelkajn konsilojn pri tio kiel respondi al komentoj.

La lastan tagon mi esploris la temon de privateco, kaj parolante pri la reguloj, kiujn ni, kiuj skribas en sociaj retejoj, devas respekti, kaj klarigante kiel defendi nian privatecon, malhelpante aliajn vidi informojn, kiujn ni ne volas sciigi (ekzemple la naskiĝdaton).



Estis multaj demandoj, iuj petis pliajn informojn pri iu socia reto (ekzemple Pinterest), aliaj raportis siajn spertojn demandante kiel ili povus plibonigi sian komunikadon; pola juristo

rakontis al ni pri sia sperto pri disputoj rilate al privateco.

Dum la tuta seminario mi ĉiam emfazis, ke la graveco de sociaj retoj por ni esperantistoj estas duobla: unuflanke ili ebligas al ni kontakti aliajn esperantistojn, aliflanke ili estas efika maniero konigi nin al la ekstera mondo. Mi aldonas la bildojn, kiujn mi uzis, kaj kelkajn fotojn. Ili estas tro pezaj por sendi, vi povas trovi ilin ĉi tie:

<https://drive.google.com/drive/folders/1hVBe2x6bznNcjTHnsZ3HHv7Uq9sYIHTO>

En la lasta bildo estas ankaŭ malgranda listo de utilaj retejoj por tiuj, kiuj laboras per sociaj retejoj.

Kroatoj renkontiĝas

Mi sendas al vi informon pri la kultura Esperanto-renkontiĝo unutaga de kroataj kaj slovenaj esperantistoj, en kiu gastas la slovena verkisto Jože Partljič, la 17-an de sept. Tio okazos 100 km sude de la hungara landlimo, en Hraščina-Trgovišće.

Necesas antaŭanonci sian alvenon per kel@esperanto.hr

Spomenka Stimec

Irano kaj ILEI helpas pri retkursoj

Jen nova paĝaro de la kursaro de Tibor Sekelj. Tio estas parto de la agado de ILEI por stimuli retajn kursojn pri Esperanto en naciaj lingvoj:

<https://www.espero.ir/eo/kursaro/>

Libroj por Afriko – UEA agas

<https://libro.ee/index.php?fbclid=IwAR1DXOkYWymG4nwNhK70Kcb8lQkzZxFeH15l1TTgl80b5P7-KxFsVigUL1l>

Per la ĉi-supra ligilo vi povas senpage havigi librojn en Esperanto.

Adje Adjévi, komisionanoj de UEA

ZPI havas planon pri Festado de Tagoj

El nia labor-plano, vidu proponon en

https://uea.org/vikio/LABOR-GRUPO_PRI_INFORMADO_AL_NEESPERANTISTOJ,

Ĝi temas pri la festado de taŭgaj tagoj por aŭ pri Esperanto.

===== vortoj: 1135 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de post 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@e-gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.